*************************************************************************

INSTRU-CIRKULERO  jan. 2006 (IC-6)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

=========================================================================

1. Urĝe! Projekto Komenius serĉas partneron !

Vi estas instruist(in)o en baza lernejo (8 ĝis 10jaraj gelernantoj). Vi emus interŝanĝi kun klasoj pri medio-protektado.
Partoprenu Comenius-projekton !
Por tiu projekto 3 lernejoj devas kunlabori. Ni jam estas 2 (ĉeha kaj franca), ni bonvenigas vin.
Nia projekto temas pri medio-protektado, kiun ni povos ankoraŭ kompletigi kun viaj ideoj.
Se tio interesas vin, kontaktu min rapide, la dosieron oni devas kompletigi antaŭ fino de januaro.

Bonvolu disvastigi tiun mesaĝon, dankon.
Jacqueline Poŭ
instruistino en Francio

La klasoj/lernejoj partoprenantaj la Komenio-projektoj devas esti el la 25 landoj de Eŭropa Unio:
Austrujo, Belgujo, Britujo, C'eh'ujo, Kipro, Danujo, Estonujo, Finlando, Francujo, Germanujo,
Grekujo, Hispanujo, Hungarujo, Irlando, Italujo, Latvujo, Litovujo, Luksemburgo, Malto,
Nederlando, Pollando, Portugalujo, Slovakujo, Slovenujo, Svedujo
au' el la EU-kandidatig'antaj landoj: Bulgarujo, Rumanujo, Turkujo
au' el la landoj de EFTA/EEE 2: Islando, Lih'tens'tejno, Norvegujo, Svisujo

---

2. La 17-an de decembro 124 studentoj el Liaoning Universitato kun
sukceso akiris 4 studpoentojn el Esperanto-kurso.

Ekde la 1-a de septembro 2005, Universitato Liaoning oficiale prenis Esperanton kiel nedevigan studobjekton, kaj tiam pli ol 500 instruistoj kaj studentoj anoncis sin por la kurso, sed pro limoj de klasĉambroj oni povis akcepti nur unu el ĉiuj kvin aliĝintoj.
Indas mencii, ke la agado de Universitato Liaoning ricevis reagojn ankaŭ el aliaj altlernejoj.
Ĝenerala Universitato kaj ankaŭ la Nordorienta Universitato en la urbo Shengyang, krome
Petrokemia Universitato Liaoning en la urbo Fushun sendis junajn instruistojn
al la kurso por esti edukita E-instruistojn.

inf: Wu Guojiang vic-prezidanto de LEA

Adreso: s-ro Wu Guojiang
Fushun Shiyouyichang Yanjiusuo
113008 Fushun Liaoning Chinio
Retadresoj: ghemelurboj@yahoo.com.cn   amikeco999@21cn.com

---

3. Listo de oficialaj universitataj E-kursoj. Informo kaj peto de Germain Pirlot :

Ĝis nun mi ricevis konfirmon pri 41 Esperantaj kursoj oficiale organizitaj en universitatoj kaj samgradaj altinstitutoj. Dankon al tiuj, kiuj afable reagis.

Konfirmitaj_ (41 kursoj en 21 landoj)
Austrio : Innsbruck
- Brazilo : Brasilia - Campinas - Curitiba - Sao Paulo
- Ĉehio : Brno

- Ĉinio : Dalian - Hefei - Hubei - Shangdong - Tianjin
- Germanio : Bamberg - Berlin - Emden - Münster - Paderborn
- Hispanio : Bilbao
- Hungario : Budapest
- Italio : Torino
- Japanio : Minoo
- Korea Resp. : Iksan - Seoul/Chonan - Seoul/Yongin
- Kostariko : San Jose 2x
- Kubo : La Habana
- Litovio : Kaunas - Siauliai
- Meksiko : Mexico
- Nederlando : Amsterdam
- Pollando : Poznan 2x
- Rusio : Tagil - Vladivostok
- Svedio : Stockholm - Umea
- Usono : Brattleboro - Elsah - Rochester - Stanford/Palo Alto
- Uzbekio : Tashkent
- Venezuelo : Caracas

Bedaŭrinde mi ricevis nenion reagon pri dekoj da aliaj kursoj. Ĉiam mi atendas respondon pri :
- Aŭstrio : Graz - Wien ?
- Belgio : Antwerpen ?
- Bulgario : Karlovo ?
- Ĉehio : Hradec Kralove ?
- Ĉnio : Beijing 4x - Guangzhou - Jinan - Nanjing - Shangdong -Shanghai - Tonghura Xian 2x - Xianxiang - Yanbian ?
- Hispanio : La Laguna ?
- Hungario : Sárospatak ?
- Israelo : Haifa ?
- Italio : Napoli ?
- Japanio : Tokyo ?
- Meksiko : Mexicali/Mexico ?
- Pollando : Krakow - Lublin ?
- Rusio : Mahackala - Moskva ?
- Slovakio : Nitra ?

Antaŭdankon pro eventualaj sciigoj ĝis la fino de januaro, kaj pro diskonigo de tiu alvoko.

Kore kaj kolege via,
Germain Pirlot
gepir.apro @pandora.be

---

4. La konferenco de ILEI kiel antaŭkongreso de la UK

La 39-a ILEI-konferenco okazos de la 25-a ĝis la 29-a de julio, 2006, en Parma, Italujo. Ĝia temo estos: "Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj", tre bele komplementa kun la kongresa temo de la UK.
Pri ĝi vi povas vidi detalajn informojn ĉe http://www.ukflorenco2006.it/unikodo/til_ar/ilei kie oni informas pri g'iaj c'efaj trajtoj:
- Kolegeca etoso en intima rondo
- Plibonigu viajn instrukapablojn

- Moderkosta loĝado kaj varia programo
- Agrablaj vesperoj kaj tuttaga ekskurso, survoje al UK

---

5. Plivastiĝanta E-instruado en Herzberg/Harz
En la meza lernejo jam de septembro komenciĝis E-instruado. Ankaŭ en la loka gimnazio gelernantoj povas eklerni E-on enkadre de la libere sed devige elekteblaj studfakoj. De februaro 2006 en 3 studgrupoj 60 infanoj de la 7-10 klasoj lernos la internacian lingvon.

---

6. ILEI-ekzamenoj dum PSI
Studsesio de Germana Esperanto-Centro, klerigejo de GEA (Herzberg, 20 km de St. Andreasberg) – dum Printempa Semajno Internacia (St. Andreasberg, 10-17.aprilo, 2006)
Favoraj kondiĉoj por gejunuloj trapasi internacian UEA/ILEI ekzamenojn

Partopreno, ofertoj:
1.a) Partopreno dum la tuta semajno (10-17 aprilo, 2006): loĝado, manĝado, preparkurso al ILEI-ekzamenoj, programoj, ekskursoj, ktp. Fakprelegoj de Studsesio, kreditpoentoj por estontaj E-instruantoj, kursgvidantoj 16-25 jaraj 165 EUR, pli ol 25-jaraj 215 EUR
granda rabato por kontribuantoj al PSI-programoj, por helpontaj organizantoj de junularaj programoj

1.b) Partopreno parttempa 6-25 jaraj 27,50 EUR/tago >25 jaraj 36 EUR/tago

2. Alternativa solvo: partopreno memzorgante
-tranoktado en Interkultura Centro Herzberg (por <26 jaraj 5 EUR/nokto, por aliuloj 10EUR)
-manĝado memzorgante (senpaga uzado de ICH-kuirejo)
-kontribueto al komuna aŭt-veturado al St. Andreasberg (ĉ. 20 km)
-fakultativa partopreno en la fakprelegoj de Studsesio (por GEJ-anoj senpaga)
-50% repago de vojaĝkostoj por GEJ-anoj
Detaloj, aliĝo: www.esperanto.de/PSI aŭ ĉe: www.ic-herzberg.de

3. ILEI-ekzameno 33,6 EUR (bv. rapide skribe aliĝi ĉe esperanto-zentrum @web.de)

---

7. 28a Studsesio (17-19 februaro, Herzberg) – Krom la ĝeneralaj pluklerigaj studfakoj ankau speciala oferto: informoj pri kaj preparoj por ILEI/GEI-ekzamenoj. Tradukkurso. Partoprenkondiĉoj kiel en punkto 2 supre, pli detale vidu sur la hejmpaĝo de Germana Esperanto-Centro www.esperanto-zentrum.de

---

FELIĈAN NOVAN JARON!
Ankaŭ en jaro 2006 mi dissendadas tiun ĉi Informilon al E-instruantoj, instruistoj, interesitoj pri E-instruado. (Se vi ne plu volas ricevi ilin, bv. skribi al mi.)

Kun multaj salutoj, dezirante bonan sanon, agrablan, eventoplenan jaron, sukcesojn:

Zsofia Korody
GEA-komisiito por instruado
zsofia.korody @esperanto.de